

elna newsletter

Newsletter published by the Esperanto League for North America

Spring 1996

ELNA kongresos ĉi-jare en Detroit

BONVENU AL LA DETROJTA REGIONO

Ĉu vi volas viziti la konstruaĵojn en kiuj la fratoj Orville kaj Wilbur Wright inventis la aeroplanon? Ĉu vi volas eniri la laboratorion kie Thomas Alva Edison kreis multajn famajn inventaĵojn? Ĉu vi volas viziti unu el la plej bonaj Usonaj artmuzeoj kie troviĝas valoregaj pentraĵoj kaj statuoj de ĉiu ĉefa artstilo kaj de ĉiu erao ekde Sumero ĝis la Picasso-jarcento? Ĉu eble vi havas tro da mono kaj tial deziras transiri riveron per la dua plej longa internacia ponto en la tuta mondo por eniri alian landon kie situas monglutemega kazino en bela konstruaĵo kiu antaŭe estis bierfarejo kaj artmuzeo?

Por trovi tiujn kaj aliajn vidindaĵojn vi devas viziti la Detrojtan Regionon kie ĉijulie okazos la 44a jara Kongreso de ELNA. Kvankam la urbo mem kun siaj 1,000,000 loĝantoj estas fifama pro la krimkvanto (kiu nun, danke al Dio, malgrandiĝas) la ĉirkaŭurboj kun siaj 3,400,000 loĝantoj estas grandparte sekuraj kaj prosperaj. Unu el la plej riĉaj kantonoj en Usono, Oakland County, estas parto de tiu regiono. Tie, en la urbo de Bloomfield Hills kie loĝas multaj direktoroj de la grandaj aŭtaj kompanioj, situas granda belega tereno kie oni povas promeni apud fontoj, lagetoj kaj malgranda lago, kie oni povas vagi en ĝardenoj kaj gazonoj kaj arbaroj. Belaj konstruaĵoj kun graciaj statuoj abundas. Sur tiu tereno troviĝas diversaj lernejoj inklude de la Cranbrook Academy, historie influa artstudejo. Tiu tereno originale estis la bieno de posedanto de Detrojta ĵurnalo. Tie George G. Booth kreigis ege agrablan pejzaĝon por artistoj, muzikistoj, lernantoj, studentoj kaj vizitantoj.

Trans la mejl-larĝa Detrojta Rivero, ĝuste sude de Detrojto situas la Kanada urbo de Vindzoro (Windsor) kun 200,000 loĝantoj. Oni povas atingi Vindzoron per ponto aŭ tunelo. La kromnomo de Vindzoro estas "Urbo de

Rozoj" kaj tie laŭlonge de la rivero sterniĝas parkĉeno kie oni povas promeni kaj bicikli. De Vindzoro oni ĝuas la vidon de la Detrojta urbocentro kun ties nubskrapuloj. Antaŭe de tempo al tempo mi ĝuis viziti la belan Vindzoran artmuzeon en kiu montriĝis multaj ekzemploj de Kanada arto inklude de la verkoj de la Inuitoj, la homoj kiuj loĝas en la norda parto de la lando kie ili konstruas glaciajn domojn. Kutime post kiam mi ĝuis la artaĵojn, mi tagmanĝis en agrabla restoracio je la kvara etaĝo. Trafenestre mi observis la riveron, kie pasas ŝipoj de Eŭropo, la Ambasadoro-ponton kaj Detrojton.

Ne plu tiel mi faras. La registaro de Ontario decidis konstrui kazinon apud la Usona bordo por rikolti Usonajn dolarojn. Nun dum oni konstruas la kazinon, oni kazine uzas la dumtempan eksmuzeon. Post kiam oni malfermos la konstantan kazinon, oni refoje artmuzeigos la nunan monperdejon.

La ELNA-Kongreso okazos en la Fairlane-Holiday-Inn kiu situas en Detrojto ĝuste apud Dearborn. Henry Ford naskiĝis en Dearborn kaj tie li konstruigis grandegan fabrikejaron ĉe la Ruĝa Rivero (River Rouge). Tie oni fabrikis ne nur aŭtomobilojn. Oni faris ŝtalon kaj vitron kiujn oni uzis por fabriki aŭtomobilojn. Nun la monda ĉefoficejo de la Ford-Kompanio estas en alta konstruaĵo en Dearborn kromnomita "La Vitra Domo" (The Glass House).

Unufoje Ford diris, "Historio estas sensencaĵo" ("History is bunk"). Tiel li intencis diri ke la historio kiun oni instruas en la lernejoj estas senvalora. Por instrui la, laŭ sia opinio, veran historion Ford elspezis milionojn da dolaroj por krei Greenfield-Vilaĝon kaj la Henry-Ford-Muzeon. Al la Vilaĝo li movigis multajn historiajn konstruaĵojn de diversaj lokoj Usonaj kaj Angliaj. Nun

turistoj el la tuta mondo promenas en la Vilaĝo kaj tie vizitas la laboratorion de Edison de Menlo-Parko el Nov-Jerzeo, la hejmdomon kaj biciklan vendejon de la fratoj Wright de Dayton, Ohio kaj la hejmdomon de Noah Webster. Tie oni povas viziti malnovajn fabrikejojn kaj vidi metiistojn kiuj kreas, ekzemple, vitraĵojn kaj presajojn. En la Vilaĝo oni ankaŭ povas rajdi lignan ĉevalon sur karuselo kaj oni povas veturi aŭ vagonare aŭ ĉeval-tirate.

En la tridekaj jaroj la fama Meksika artisto, Diego Rivera, observis la laboristojn en la Ford-fabrikejoj en Dearborn. Post tiam li murpentris tion, kion li vidis en la Detrojta Artmuzeo (Detroit Institute of Arts). Krom la rezulta majstroverko de Rivera, la Detrojta Artmuzeo enhavas grandan aron de Afrikaj artaĵoj, kiun donis G. Mennen Williams, eksŝtatestro de Miŝigano kaj helpa ŝtatministro por Afriko de John F. Kennedy; valorigan aron de pentraĵoj de la Francaj impresionistoj kiel Renoir kaj Degas, kiun testamentis R. Tannerhill; panelon de la Iŝtar-enirejo de Babilono kun mita besto; pentraĵojn kaj statuojn kiujn verkis dekoj de famegaj artistoj apartenantaj al dekoj da landoj kaj al multaj jarcentoj.

La Artmuzeo staras en la Kultura Centro de la urbo. Je la alia flanko de Woodward Avenue, la ĉefa strato de Detrojto, troviĝas la ĉefa biblioteko, donaco de Andrew Carnegie. En tiu centro situas Wayne State University kiu havas multajn interesajn konstruaĵojn. Mondfama loka arĥitekto, Minoru Yamasaki, kiu dizajnis interalie la konstruaĵojn de la World Trade Center en Novjorko, dizajnis belegan japaneskan konstruaĵon por tiu universitato, la McGregor Memorial Building.

(daŭras sur la sekva paĝo)

From the Central Office

We have some excellent news: this will be the final edition of the *ELNA Newsletter*, for a volunteer has finally come forward to take on the job as editor of the regular newsletter *Esperanto USA*. He is aiming for a press date of May first, so you should receive the first issue of the new newsletter some weeks after that. The editor will introduce himself in the coming issue, so I will not reveal his identity at this time. Perhaps the added suspense will encourage some ELNA members who have long intended to write an article or a letter to the editor finally to do so. We still accept contributions for *Esperanto USA* by e-mail at elna@netcom.com or by snail-mail at P.O. Box 1129, El Cerrito CA 94530 or by fax at 510/653-1468. I especially encourage members of local clubs actively to report on club activities. By the way, editors of local newsletters are invited to send copies to the International Esperanto Museum in Vienna (Hofburg, AT-1010 Wien, Austria) and to UEA (Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Netherlands), in addition to our office. This also holds for pamphlets and books written in Esperanto: the archives and catalogs await your contributions!

Soon we will be mailing out ballots for the election of a new president, vice president and three members of ELNA's Board of Directors. There will also be a vote on several changes in the By-Laws. Please read the ballots carefully and send them back timely.

Now that the Spring weather thaws us from our discontented Winter, it is time to consider our plans for the rapidly approaching Summer. I hope that many of you readers are planning to go to the ELNA convention in Detroit this summer. Sherry Wells and the convention committee are planning a fresh and fun new style of gathering, with plenty of focus on youth activities. The center of the automotive industry and the "Motown Sound" offers many museums and parks. You can also claim to have "gone South to Canada" because of a kinky border-line. And gambling casinos are available for fans of "Lost Wages"-style entertainment. Be sure to

read Sylvan Zaft's article in this issue for details.

As usual, this summer will present many opportunities to use and improve your skills in Esperanto here in the United States. Derek Roff, a member of ELNA's board of directors, will be the lead teacher of the 27th annual San Francisco State University three-week intensive courses from June 24 til July 12. Derek will be joined by Katalin Smidéliusz, Hisasi Kitagawa and Dorothy Stermer. (Some scholarships are still available! Contact me or Cathy Schulze for details.) There will also be a week-long session at the University of Hartford from July 7-13, where the teachers will be Spomenka Štimec and Joseph Conroy. Sherry Wells will be teaching several weeklong courses in Detroit from June 17-21 and again from July 8-12. Who says that the U.S. is far removed from the education centers of Esperantujo?

After the ELNA congress, many ELNA members will travel to the Universal Kongreso in Prague. I had such a good time last summer in Finland that I have decided to participate again this year. Prague is one of the most exciting cities in Europe nowadays. It will be especially fun to live in a city within a city as the Capital of Esperantujo materializes in the middle of the famous Golden City. And I shall take part in the Internacia Junulara Kongreso again this year, even though I am no longer a youth. The energy and enthusiasm of this group is truly inspirational! The rural villages of the Harz-mountain region of central Germany are gorgeous, and will be a great setting for an international youth gathering.

Let me remind those of you who will be in Prague for the UK (and those who will be vacationing elsewhere in Europe) that Ionel Oneț will be the guide for a group touring Romania, the exotic land of vampires and panpipes. This tour, which will take place directly after the end of the UK, will present a unique chance to see Transylvania from the local angle. Contact Lusi Harmon or Ionel for details.

(daŭrigo de la antaŭa paĝo)

Tridek minutojn okcidente de Detrojto situas la urbo de Ann Arbor kie troviĝas la mondfama Universitato de Miŝigano. Tiu universitato havas bonan artmuzeon, kun verkoj de Picasso, kaj bonan naturmuzeon, kun kelkaj dinosaŭroj kaj eĉ kelkajn sukcesajn sportteamojn.

Multaj famaj kompanioj komenciĝis en Detrojto kaj la apudaj urboj. Tiuj inkludas Dominos Pizza, Borders Bookstores, K-Mart, Ford, Chrysler kaj General Motors.

Se oni deziras ne perdi monon sed elspezi ĝin oni povas elekti inter multaj grandegaj vendejaroj. Unu el la plej grandaj estas Fairlane kiu situas ne malproksime de la kongresejo. Eble la unua moderna grandega vendejaro estis Northland en norda ĉirkaŭurbo de Detrojto nomita Southfield. Oni povas elspezi monon ankaŭ en Vindzoro.

La regiono havas famajn sportteamojn je glaciĥokeo (Red Wings), korbopil-ludo (Pistons), Usona piedpilkludo (Lions) kaj baspilkludo (Tigers.) Ĝi havas mondfaman orkestron kiu kreis multajn sukcesajn kompaktdiskojn. Tiu orkestro ludas en unu el la plej bonsonaj orkestraj haloj de la tuta mondo.

En la kamparo nur horduonoj for de la urbo estas multaj grandaj belaj parkoj kie oni povas promeni, vidi birdojn kaj cervojn, tendumi, skii, naĝi, fiŝkapti, boati, bicikli kaj golfludi. Oni povas kapti salmojn en la urbo mem, en la Detrojta Rivero.

Kiam multaj homoj pensas pri Detrojto ili pensas nur pri aŭtomobiloj kaj krimoj. Verdire, tie oni fabrikas multege da aŭtomobiloj kaj, bedaŭrinde, oni krimas. Tamen ekzistas en la internacia urbega regiono, kun ties Norvegio-kvanta loĝantaro, ankaŭ multege da valoraj kaj interesaj vidindaĵoj, multege pli ol oni povas indiki en mallonga artikolo.

Sylvan ZAFT

Por aldonaj informoj, kontaktu la aŭtoron (810/471-0188). Por flugbiletoj al/de Detroit, kontaktu Lusi Harmon (510/339-2001). Por volontuli antaŭ kaj dum la kongreso, kontaktu Sherry Wells (810/543-5297).

Miko

Kongresaj aliĝiloj baldaŭ sendiĝos.

KIEL ESTI INTERNACIA ĜENTILHOMO

Esperantistoj vojaĝas. Iuj ofte, iuj malofte, laŭ la financa stato, kapablo kaj sorto. Kaj tiuj, kiuj ne povas vojaĝi eksterlanden foje renkontas eksterlandajn Esperantistojn en sia propra lando.

Ĉar Esperantistoj havas la rimedon de komuna lingvo, kiu ebligas pli facilan kaj pli rapidan amikiĝon eksterlande, ili havas avantaĝon kompare kun la ordinaraĵoj ne-Esperantistaj turistoj. Tiuj ĉi estas ofte unulingvuloj, kiuj agas kvazaŭ ili portas kun si pecon de propra hejmlanda tero; babilas nacilingve inter si, serĉas tiun raran "fremdulon" dum la vojaĝado, kiu scipovas la nacian lingvon de tiuj turistoj, kaj grumbas inter si: "Kial ĉi tiuj homaĉoj ne parolas nian lingvon?!"

Kaj pro alia eco oni povas rekoni tiujn "ordinarajn turistojn"; ili ofte ignoras la kutimojn en la vizitata lando, agas laŭ la kutimoj kaj moroj de sia hejmlando, kaj tiel kaŭzas embarason, ĝenon, eĉ ofendon. Ili tiel estiĝas prototipe "fremduloj" kie ajn ili estas.

La pli intima kontakto inter la Esperantista vojaĝanto kaj la renkontitaj Esperantistoj en la celita lando preskaŭ devigas, ke oni kiel eble plej rapide lernu ion pri la lokaj kutimoj; ne nur por eviti embarason, sed ankaŭ por vere pli intime konatiĝi kun la kulturo kaj rapidigi la interamikiĝon. Koncize dirite, oni devus esti "Internacia Ĝentilhomo" en la okuloj de la gastigantoj.

Dum pli ol kvindek jaroj kiel Esperantisto, mi vizitis multajn landojn; kaj pli kaj pli konstatis la valoron kaj la bezonon de antaŭscio pri lokaj kutimoj. Tiucele mi ellaboris por mi mem "regularon" pri tio, kaj pri la kategorioj de kutimoj kaj moroj atentendaj. Esperante ke tiu "regulato" helpas al aliaj Esperantistoj - precipe novaj, unuafoje vojaĝantaj eksterlanden - mi tie ĉi prezentas konsilojn pri kiel estiĝi "Internacia Ĝentilhomo".

LA BAZA PRINCIPO.

Celu lerni, ne juĝi. Alfronto de loka kutimo povas facile konduki al komparo kun la propra. Memoru, ke objektive ne ekzistas "bonaj" kutimoj aŭ "malbonaj" kutimoj; nur *malsamaj* kutimoj.

LA DUA PRINCIPO.

Evitu konjektadon. Demandu, ne supozu. Se vi mem provas interpreti iun kutimon aŭ geston, vi povas tion fari nur per viaj propraj moroj, vivo kaj kulturo. Tial vi ne povas esti certa, ke vi ĝuste komprenas la signifon kaj uzon. Anstataŭ konjekti aŭ supozi, faru mensan noton kaj je taŭga tempo pridemandu al loka Esperantisto. Agi tiel havas belan flankbonon; vi ne nur lernos ion utilan, sed tiu al kiu vi demandis estos feliĉa ke vi montris tiun intereson kaj ĝentilecon.

LA KATEGORIOJ ATENTENDAJ.

Ni nun konsideru la kategoriojn atentendajn. Ne temas pri lerni socian sciencon aŭ antropologion; vi celas plibone kompreni la agadon ĉirkaŭ vi kaj eviti senkonsciajn tamen eble krudajn aŭ ofendajn agadojn kaj eĉ malĝentilaĵojn.

1. Salutado.

Je la unua renkontiĝo, sekvu vian propran kutimon; tamen rigardu kiel la lokaj homoj salutas unu la alian. Ekzemple, en multaj Aziaj landoj la loka kutimo estas riverenco per kliniĝo de la supra korpoparto. Tion vi prefere ne provu imiti, ĉar la kutimoj estas komplikaj (kiel kliniĝi, kiom longe, kiu restariĝas unue, ĉu kun okulkontakto, ktp ktp) kaj provante imiti, vi povus agi ridige.

En iuj landoj la homoj kutime ne tuŝas unu la alian fizike. Tamen preskaŭ ĉie simpla manprema saluto estas komprenata kiel ĝentila saluto. Iuloke homoj kutime brakumas, tenas la ŝultrojn, eĉ kisas (kiomfoje? kiu(j)n vango(j)n? ĉu "enaere" aŭ survange?) kaj tiuj kutimoj varias laŭ la cirkonstancoj kaj la rilato inter la renkontantoj.

Estas sugestite ke, antaŭ ol vi bone konas la kutimojn tiurilate, sekvu vian propran kutimon en formala okazo. Ne agu tro intime ekde la komenco.

2. Vokado.

Kiam estas necese voki iun voĉe - kio estas la loka kutimo? Ekzemple, la uzo de antaŭnomo aŭ karesnomo, eĉ mallongigita nomo, varias multe inter diverslandaj kutimoj. Kelkloke la tuja uzo de antaŭnomo, eĉ kun la plej bona intenco kaj bonvolo, povas ofendi. Aliloke, vi

devos al kutimiĝi al la tuja uzo de antaŭnomoj.

Estas sugestite ke, se ekzistas ia dubo, vi uzu la plenan formalan nomon, inkluzive titolon se vi tion scias. Poste, je taŭga tempo, demandu al via nova konato kiel tiu preferas esti vokita.

Kiel kapti ies atenton? Ankaŭ pri ĉi tio la kutimoj tre varias. La uzado en Usono de "Hej!" preskaŭ nenie taŭgas en aliaj landoj. Se vi alvokas per "Atentu!" aŭ "Aŭskultu!" vi aspektos abrupta. Prefere ne laŭtvoĉe voku iun de malproksime; iru al tiu. **NENIAM** fajfu por kapti atenton.

En restoracio, kelkloke estas kutime voki kelneron per aplaŭdo aŭ fingroklako. Aliloke tio garantios ofendon (kaj tre eble malbonegan servadon). Neniu petu atenton per tiro de maniko aŭ per frapeto de fingro sur korpo. Se vi uzas mangeston, tion faru nur diskrete.

Kio pri mansignoj? La uzo de mansignoj varias ege ĉirkaŭ la mondo. Foje en Japanio mi provis alvoki kelnerinon per mansvingo kutima en Usono, manplato supre. Mia Esperantista kunulo tuj avertis min, ke oni en Japanio tiel vokas nur *hundon*; por voki homon, oni turnas la manplaton malsupren kaj svingas la fingrojn al si. En multaj landoj ekzistas preskaŭ aparta lingvaĵo de fingro-kaj mansignoj, kaj tiu lingvaĵo inkluzivas filingvon. Evitu la uzon de tiaj gestoj antaŭ ol vi bone komprenas la lokan signifon.

3. Manĝado.

Pri ĉi tiu homa agado kutimoj abundas, kaj abunde varias. Ekzemple en iuj lokoj aŭdebla rukto ĉe la tablo silentigos la tutan ĉambron per ŝoko; en aliaj lokoj, tio estas ne nur akceptebla konduto, sed povas esti eĉ komplimento al la kuiristo. Iuloke oni englutas supon per akvofaleca bruado. En aliaj landoj, oni kiel eble plej silente manĝas. Manĝi per la fingroj estas akceptebla konduto kelkloke, kaj eĉ religiaj reguloj diktas per kiuj fingroj kaj manoj oni rajtas fari kion. Iuloke oni rajtas preni la bovlon aŭ teleron en la mano kaj levi al la buŝo; aliloke, tia konduto ŝokus kaj ofendus.

(daŭras sur la sekva paĝo)

Estas sugestite, ke kiam vi unue sid-iĝas ĉe la tablo, iom hezitu kaj rimarku kiel agas la lokanoj pri la manĝado, kaj provu imiti ilin. La diferencoj pri manĝ-kutimoj povas esti sprita temo por la ĉetabla konversacio, kaj en la diskuto, ĉiuj lernos ion novan pri aliaj kulturoj. La Usona kutimo pri uzo de tranĉilo kaj forko mirigas multajn eksterlandanojn!

Se pro religia aŭ kultura kialo vi ne povas manĝi ion sur via telero, prefere simple ne manĝu ĝin sen tiri atenton al tio. Se iu demandas kial vi ne manĝas ion, vi rajtas diri ĝentile ke vi jam manĝis sufiĉe aŭ simile klarigi. Se via gastiganto estas simile ĝentilhomeca, tiu antaŭ la manĝado petos vin pri viaj manĝokutimoj kaj preferoj. Sed estas sugestite, ke vi ne trudu tian informon proprainciate.

4. Donacoj.

Tre ĝenaj problemoj kuŝas en la kutimoj pri donacoj. Reciproka donacado estas intima parto de multaj kulturoj, kaj kelkloke la sistemo estas tiel komplika, ke ĝi estas preskaŭ ne lernebla de vizitanto. Estas konsilinde donaci nur modeste kaj nur je taŭgaj okazoj. Estas bone porti aron da malmultekostaj donacoj el la propra lando, se eble io unika al tiu lando. Belaj bildkartoj aŭ fotografajoj de vidindaĵoj el la propra lando estas kutime ĝoje akceptitaj, speciale kun surskribo amikeca.

Ne tro entuziasmiĝu pri iu posedajo de via gastiganto; en kelkaj mondpartoj tio devigas, ke la posedanto ĝin donacu al vi vole-nevole. Certe vi rajtas esprimi miron aŭ plezuron pri la beleco de iu pentraĵo aŭ skulptaĵo; tamen ne troigu sed laŭdu mallonge kaj nur unufoje.

Estas sugestite, ke vi atendu ĝis via gastiganto mem montras al vi siajn ŝatajn posedajojn. Prefere vi ne iniciatu. Se vi ricevas donacon kaj volas reciproki, faru tion per io se eble pli-malpli samvalora, certe ne multe plivalora, por eviti embarason. Se vi scias, ke la naskiĝtago aŭ nomtago de via gastiganto okazos dum via vizito, salutu per modesta donaco aŭ salutkarto.

5. Pri hejmoj.

En iuj lando vi eble estos invitita al ies hejmo. En aliaj landoj, tio preskaŭ neniam okazas. Se vi estas tiel invitita,

se eble antaŭe enketu pri la ĉefaj kutimoj en tiu loko. Ekzemple, en iuj Aziaj landoj oni deprenas la ŝuojn antaŭ eniri la hejmon; se oni portas mantelon aŭ ĉapelon, tiujn oni deprenu antaŭ eniro. Kvankam kutimoj tre varias pri gastigado, bona ĝenerala regulo estas, ke vi ne tuj agu kiel enketema kato, tranazumante ĉambrojn ktp. Atendu ĝis la gastiganto mem kondukas vin. Estas konsilinde ke vi akceptu la seĝon indikitan de la gastiganto, eĉ se ĝi ne aspektas tre komforta. Escepte kiam temas pri religia aŭ sanstata kialo, neniam rifuzu trinkon aŭ manĝaĵon al vi proponitan de la gastiganto.

Lastatempe la afero pri fumado/nefumado estiĝas pli kaj pli grava. Estas tre konsilinde unue demandi al via gastiganto ĉu oni permesas fumadon en ties hejmo. Se enirante vi ne rimarkas cindruojn, ne fumu ĝis la gastiganto klarigas ĉu vi rajtas tion fari. Kaj se vi rajtas fumi, tamen ĉe la tablo neniam fumu dum iu manĝas, escepte ke la gastiganto tion iniciatas aŭ urĝas.

Se vi gastigas eksterlandan Esperantiston en via hejmo tranokte, konduku tiun tra la hejmo, klarigante pri la funkciado de diversaj de li uzotaj objektoj kiel bano, necesejo kaj tukoj. Pensu pri tio, kion vi mem volus scii se estus vi en fremda hejmo; kaj tion sciigu al via gasto.

6. Fotografado.

En iuj landoj homoj ne deziras esti fotitaj sen permeso. En iu ajn lando, estas konsilinde peti permeson antaŭ foti iun, aŭ posedajon de iu. Se vi fotas gastiganton kaj/aŭ ties familianojn dum vizito, nepre poste sendu ekzemplerojn de la plej bonaj fotografajoj al ili. La kosto estas bagatela, kaj la ĝojo valoras multe pli.

Estas ĝentile, ĉiam peti permeson la unuan fojon kiam vi celas foti iun.

KONKLUDO

Jen eta regularo kaj kelkaj sugestoj. Kompreneble ekzistas pli da kategorioj; estas kutimoj pri interŝanĝo de nomkartoj; kiel alparoli familianojn, infanojn; pri dorlotbestoj; ktp ktp. Tiu, kiu agas antaŭpenseme kaj sentive evitos embarason, pli ĝuos la viziton, kaj des pli bone - estos refoje invitita.

Esperanto estas la ilo, kiu ebligas interkompreniĝon kaj amikiĝon per forigo de lingva barilo. Kaj ĝentileco estas la ilo, kiu faciligas tion per forigo de la bariloj kulturaj.

Ni ĉiuj estu "internaciaj ĝentilhomoj"!

William R. HARMON

Deziras korespondi

BJELORUSIO: Alexey TOLMACHOV, ab. ja. 386, BY-220113 Minsk. Deziras korespondi kun kristanoj.

FINNLANDO: Esko KANNAS (46-jara eksfotisto preseja), Pohjolank. 33 B 32, FI-87100 Kajaani 10. Deziras korespondi kun virinoj.

HUNGARIO: Márta BENCZE (12-jara lernantino), Tégláskert u. 22/B, HU-4030 Debrecen; Lajos KISS (13-jara lernanto), Basahalom u. 27/A, HU-4030 Debrecen; Bernadett KOVÁCS (12-jara lernantino), Tégláskert u. 31, HU-4030 Debrecen; Tünde SZILÁGYI (11-jara lernantino), Balaton u. 128, HU-4030 Debrecen; Krisztián SZŰCS (12-jara lernanto), Szepesi u. 77, HU-4030 Debrecen; Viktória TÓTH (14-jara lernantino), Horgász u. 23, HU-4030 Debrecen. Deziras korespondi kun samaĝuloj.

KUBO: Yonel GLEZ (20-jara studento), Ana Betancourt #67, el Martí y Benito Morell, CU-72600 Guáimaro, Camagüey.

LATVIO: Māra TIMERMANE (35-jara sinjorino) kaj Una TIMERMANE (14-jara lernantino), Kr. Valdemāra 145/1-32, LV-1013 Riga.

POLIO: Lukasz BARAN (24-jara fraŭlo), Gora Ropczycka 27, PL-39120 Sędziszów Młp.

RUMANIO: Klaso de infanoj lernantaj Esperanton kadre de la projekto *Fundapax* deziras korespondi kun aliaj infanoj. Skribu rekte al la instruisto: Prof. Mihai TRIFOI, Școala Generală Mikes Ármin, RO-4038 Bixad, Jud. Covasna.

LA 3A AMERIKA KONGRESO DE ESPERANTO

Recenze

La Kongreso okazis la de 12a ĝis la 17a de februaro, 1996 en San José, Kostariko. La kongresejo estis en la Fakultato pri Beletro de la Universitato de Kostariko, kies fako pri filologio, lingvistiko kaj literaturo apogis la aranĝon. Partoprenis 50 homoj el 11 amerikaj landoj kaj 6 eŭropaj landoj. Naŭ nord-amerikanoj ĉeestis: Ellen kaj Paul Eddy, Rochelle Grossman, Doroteo Holland, Bill Maxey, Vivian Mets kaj Dori Vallon-Wheeler el Usono, kaj Suzanne Caron-Richer kaj Jean Smythe el Kanado. Aliaj amerikaj landoj kiuj estis reprezentitaj estas: Argentino, Brazilo, Kolombio, Kostariko, Kubo, Meksiko, Nikaragvo, Panamio kaj Venezuelo.

La impona malferma ceremonio inkluzivis salutojn kaj paroladojn de la D-ro Arnoldo Mora, Ministro pri Kulturo; D-ro Luis Garita, Rektoro de la Universitato; Enrique Margery, Dekano de la Fakultato pri Beletro; Flor Garita, Direktoro de la Fakto pri Filologio, Lingvistiko kaj Literaturo; Hugo Mora Poltronieri, Prezidanto de la Kostarika Esperanto-Asocio; Atilio Orellana Rojas, Reprezentanto de UEA kaj ILEI kaj Antonio Leoni, Prezidanto de la Loka Kongresa Komitato. Salutmesaĝoj de la reprezentantoj de la Landaj Asocioj inkluzivis la belajn vortojn de Rochelle Grossman nome de ELNA. Ŝi gratulis la Kostarikanojn pro ilia laboro konservi la belan naturon de la lando kaj pro ilia laboro celanta pacon. La malferma ceremonio okazis en nova Kultura Centro de la urbo kreita el antaŭa alkoholaĵa fabriko. Ni ĉiuj rimarkis la grandajn numerojn farbitajn sur la muron ĉe le enirejo de la centro: 1887. Ŝajne estis bona signo por nia ĉeesto tie.

Inter la laboraj sesioj, seminarioj kaj ekzamenoj, ni ĝuis ekskursojn al la Universitato de Paco lokita sude de San José kaj al la Ĝardeno Lankaster, ĝardeno kaj internacia esplorcentro pri orkideoj de la Universitato. Vizitantoj ricevis etan orkideon en fermita flakoneto kiel memorajon. Aliaj distraj aferoj inkluzivis pianrecitalon de Teresita Ines Alaniz de Argentino, popoldancojn de Norda Kostariko kaj muzikon kaj kantojn kun instrumentoj kaj vortoj el la 15a kaj 16a jarcentoj.

Rekomendoj de la kongreso inkluzivas: (1) Kreado de kongresa libro por helpi aliajn plani plej efikajn kongresojn. (2) Kreado de Komisiono pri Amerikaj Aferoj en ĉiu landa organizo, kun unu persono kiu respondecos pri interŝanĝo de informoj kaj novaĵleteroj inter ĉiuj landaj E-organizoj. (3) Kreado de interreta novaĵletero kiu estos kunmetita ĉe la Universitato de Kostariko sub la gvidado de Antonio Leoni. (4) Kongresoj ĉiun trian jaron nomitaj Tut-Amerikaj Kongresoj. La loko de la kongreso alternos inter Norda, Suda kaj Centra Ameriko. La venonta okazos en Bogotá, Kolumbio en 1999. Espereble la sekvonta okazos en Nordameriko en 2002. (5) La nomo de la Amerika Fonduso ŝanĝiĝos al Latinamerika Fonduso por forigi konfuzon ("amerika" por multaj signifas "usona"). (6) Kunveno de komitatanoj dum la jara UK. Loko estas jam elektita en Prago ĉi-jare.

La Kostarika Kongreso certe estis grava paŝo por antaŭenigi Esperanton en nia hemisfero. Ni havas tri jarojn de kunlaborado antaŭ la venonta kongreso. Mi esperas ke ni ĉiuj estas pretaj helpi en ia maniero. Unu plej simpla afero estus por usona klubo ĝemeliĝi kun Centra aŭ Sudamerika klubo. La persona interrilato certe plifortigus ambaŭ grupojn.

Ellen M. EDDY

(daŭrigo de la recenzo)

p.115 Bibliografia skizo pri la aŭtoro. Iom pri liaj vivo kaj verkaro. Se akriĝis vian apetiton ĉi tiu kolekteto, jen listo de aliaj verkoj exploreblaj. Krom la originalojn hungarlingvaj, vi atentu la jam ekzistantajn tradukojn en la franca, germana, itala, pola, rumana, rusa, kaj ĵus eldonita angla. Sed antaŭ ekserĉi kaj trovi tiujn versiojn, ĝuu la nunan novelaron unu- al plurminute, iom post iom. Kaj pripensu la anatomian neeblojn sur la kovrilo. Ĉu ĝi fiksu la sintenon per kiu vi aliru la kolekton?

Reginald JADERSTROM

Örkény, István: **Unuminutaj noveloj**. Elektitaj de István Ertl. Berkeley: Eldonejo Bero, 1994. 120p. ISBN 1-882251-06-7. Ĉe ELNA: kodo UNU003, prezoj: \$7.95 (nemembroj)/\$7.55 (membroj)

Jen alia hungara aŭtoro prezentata al ni pere de Esperanto. István Örkény (proksima prononco ER-kenj) naskiĝis en 1912 kaj vivis ĝis 1979. La titolo eble jam kaptis vian atenton. Ĉu ne estus plaĉe legi novelojn *unuminutajn*? Oni povas ja finlegi unu aŭ du erojn ĉe bushaltejo, dum paŭzo inter kurskunsidoj, dum reklam-anoncoj en televid-programoj. Fakte, similan konsilon ni trovas en la libro mem (**Uz-instrukcioj al la "Unuminutaj Noveloj"**, p.25).

Fakte, la longeco de ĉiu aparta noveleto varias: de sep linioj ĝis preskaŭ ses plenaj paĝoj. Kaj varias ankaŭ la kompreneblo inter la ĉirkaŭ 60 eroj. Se vi fine ne sukcesos tutkompreni, legu do la eldiron sur p.25: "Kiu ion ne komprenas, tiu legu denove la koncernajn verkaĵojn. Se ankaŭ tiel li ne komprenas, la manko estas en la novelo". Sufiĉe humila eldiro, por kio vi ankoraŭ havos ŝancon eligi vin el eventuala embaraso.

Ni rigardu kelkajn erojn:

p.6 **La retransformiĝo** (6-paĝa, kelkminuta). Ĉu plaĉas al vi la maladirektan verkon de Kafka? Komparu do kun ĉi tiu.

p.57 **Ĉiam restas espero**. Pri komplikajoj en elekto/aĉeto de kripto.

p.78 **Leteroj hungar-rilataj**. Leteroj de Ejnstejn, Thomas Mann, S-ino Hitler, ktp., al fama (?) kolektanto/scienculo/inventisto.

p.105 **Trilo**. Ordinaraĵo eventoj en la ĉiutaga travivado de tajpistino.

p.113 **Glosaro** (mallonga) kaj **Notoj**. Klarigoj por helpi vin kompreni dum legado. Eltrovu signifojn de la nomoj Voronjeĵ, Imre Szallai, Erzsébet-ponto ktp. Ekkomprenu enkuntekstajn aludojn al "liberbatalo", "grupvojaĝo al Jugoslavio", ktp. Eksciu alilingvajn terminojn (precipe germanajn): Zum Wohl, Das Salz, Feldweibel.

(daŭras fine de la centra kolumno)

REPORT ON THE ELNA VIDEO-COURSE PROJECT

[MAZI is delightful, but — it does not fill the need for a video course for adults and young adults, which can be shown on television or in the classrooms of high schools and universities. The Video-Course Commission has been working on such a project for several years. It is an expensive and audacious task, but we have come a long way. The following is the report of current status by the author of the proposed course, Edwin Grobe. Lucy HARMON, Commissioner]

Since I became the chief writer of the ELNA Video-Course Project some two or three years ago, the goals and methods of the undertaking have been modified many times, largely in response to suggestions made by numerous persons who have read earlier versions of the script or who have seen portions of the script acted out in impromptu try-out sessions held at various regional, national and even international meetings.

Currently undergoing its fourth revision, the 400-page script is being fashioned to conform to the following guide lines:

1. The finished product will be a series of 15 one-half-hour lessons organized in situation-comedy format with a cast of principal characters who appear in all or most of the lessons and of secondary characters who appear only sporadically.

2. The primary target-audience will be young adults (high school and college age), but because the elected dramatic format is to involve a family of six — father, mother, and four children — and set them in frequent conflict with each other as well as with the world at large, it is to be hoped that viewers whose ages fall outside this target range will also be attracted to the series.

3. The lesson materials will be presented in direct-method format. That is to say, no language other than Esperanto will be used in the spoken or written elements of the films. In other words, language-to-language translations will occur nowhere in the 15-lesson series. Viewers, it is hoped, will deduce the meaning of the spoken text in the context of the dramatic action which occurs on the screen. Great portions of spoken dialogue will materialize visually on the

screen, however, at the moment they are spoken, in the form of written sub-titles, much in the same manner of sub-titles in foreign language films. These subtitles will not, of course, provide English translations of the spoken text but rather will reproduce the Esperanto text itself. Thus, viewers will have simultaneous access to both spoken and written versions of the dialogue.

A primary motive for using the direct method is the desire to make the completed course available to Esperanto instructors living in countries where English is not spoken.

4. The course can be used by independent learners in the privacy of their own homes or by instructors working in a classroom situation in front of assembled students.

5. The lesson material will not encompass the entire range of Esperanto grammar, vocabulary, style and usage. Rather, it will be conceived as the first half of a two-part series, much in the manner of an introductory foreign language course organized in a two-semester sequence at the high school or college level.

6. The characters of the dramatic series will be presented as larger-than-life social or professional stereotypes (a forgetful philosopher, a ballet dancer, a long-distance runner, a band majorette, a sculptress with an artistic temperament, a fully-accredited teen-aged judge) who dress in bizarre costumes and behave in idiosyncratic manners, but who, somewhat like circus clowns, nevertheless experience authentic human emotions and evoke the sympathy of the viewer.

It is to be hoped that the uncommon, often almost surrealist physical appearance and behavior of the characters will help extend the interest of the viewers far beyond the purely academic limits of the film series. The goal of this approach to dramatic characterization is to create a kind of animated-cartoon atmosphere without having to incur the enormous expense of real animation.

7. In addition to providing instruction in the Esperanto language proper, the course will also, by explicit or implicit dramatically constructed example, teach the Esperantist philosophy of equality of

all nations, ethnic groups, cultures, religions, genders, ages, professions, etc.

Efforts to create a viable working script acceptable to all interested parties have been hampered by the following factors:

1. Disagreement over what the target audience should be.

2. Disagreement over what instructional method to use.

3. Disagreement over whether to use live or non-live actors.

4. Uncertainty about eventual financial support and the level of technological excellence to strive for.

5. The geographical distance separating the individual participants in the project and the long delays that necessarily occur in exchange of communication between them.

6. Physical and mental fatigue that beset the participants in their years-long, almost daily confrontation with the problems of the undertaking.

7. Lack of wide-spread and strongly voiced moral and financial support for the project in the North American Esperanto community.

8. The need for constant script revision to accommodate the widely dissimilar opinions of those having direct access to the creative process.

9. The need to create the entire 15-lesson script before filming can begin, a condition unlike that of commercial television in which early episodes of situation comedies can be written and filmed without the writers' having to know in advance what will happen in subsequent episodes.

10. Changes introduced in earlier lessons that automatically require corresponding changes in subsequent interlocking and interrelated lessons.

However, in spite of the difficulties encountered thus far, the participants in the project reaffirm their desire and willingness to see it through to completion. They are convinced that when the finished film series is finally presented to the public, it will be perceived as a new, major tool for promoting the learning and use of Esperanto in North America and the world.

March 10, 1996
Edwin P. GROBE

ELNA CORRESPONDENCE COURSES

Learn Esperanto in the convenience of your own home through ELNA's Home Study Program! There is no time limit.

Each level is self-contained so that all you need is some spare time and a tape-recorder. In addition, your course will be guided by a qualified instructor of Esperanto who will give you the personal attention you need. Levels One and Two emphasize development of everyday conversational skills.

LEVEL ONE • Using the textbook and cassette tape for the popular *Jen nia mondo 1* radio course, this twelve-lesson course will guide you to mastery of basic Esperanto.

COURSE MATERIALS: Workbook (32 pages), *Jen nia mondo 1* book (66 pages), *Jen nia mondo 1* audio cassette. **\$38.50** (+ \$1.50 sales tax for Californians)

LEVEL TWO • This thirteen-lesson course focuses on a more detailed analysis of Esperanto as a language in its own right, and is recommended for the serious student as a follow-up to Level One.

COURSE MATERIALS: Workbook (53 pages), *Jen nia mondo 2* book (89 pages), *Jen nia mondo 2* audio cassette. **\$42.00** (+ \$1.70 sales tax for Californians)

NOTE: *If you already have the Jen nia mondo set for either level, you may deduct \$14.50 from the price of the course. (Californians deduct \$15.55)*

Levels Three and Four, both completely in Esperanto and adapted from two popular Eastern European textbooks, focus on grammar and Esperanto history. Although they both contain word lists with Esperanto definitions, a good English-Esperanto dictionary would be helpful, especially for translation exercises. No cassette is included in the course materials; however, students are encouraged to exchange tapes with their instructors.

LEVEL THREE • Based on an Esperanto class's adventures and including fables, anecdotes and Esperanto history, this twenty-five lesson course uses progressively more complex texts for expanding vocabulary and polishing grammar.

COURSE MATERIALS: Workbook (183 pages) **\$53.50** (+ \$1.10 sales tax for Californians)

LEVEL FOUR • In the fourteen lessons of this course the student is exposed to the highlights of Esperanto history and culture and the fine points of Esperanto grammar, as well as to the art of translation.

COURSE MATERIALS: Workbook (98 pages) **\$32.00** (+ \$.75 sales tax for Californians)

ELNA CORRESPONDENCE COURSE REGISTRATION FORM

Return the form with check or money order payable to ELNA to: *ELNA, P.O. Box 1129, El Cerrito CA 94530*

Date: _____

Name: _____

Address: _____

City/State/Zip Code: _____

Telephone/Fax: _____

Please enroll me in the correspondence course indicated below. I am enclosing \$_____.

LEVEL ONE

LEVEL TWO

LEVEL THREE

LEVEL FOUR

Ni vojaĝu en 1996 al...

San Francisco State University

June 24 - July 12 - 3-week intensive multi-level course. Instructors: Katalin Smidéliusz (Hungary), Hisasi Kitagawa (Japan), Derek Roff and Dorothy Stermer (USA).

University of Hartford

July 7-13 - 1-week intensive multilevel courses. Instructors: Spomenka Štirnec (Croatia), Joseph Conroy (USA) with UofH Pres. Humphrey Tonkin.

Jarkongreso de ELNA

Detroit, Michigan, July 13-17

Detroit is a polyglot community and as yet an underrated tourist destination. Settled by the French in 1701, its name means "City of Straits", referring to the river which connects Lake Erie with Lake St. Clair and forms a segment of the international border with Canada.

During and after our official ELNA meetings, there is much to see and do including: Detroit Cultural Center, Fairlane Town Center, Detroit's Riverfront summer festivals, Greektown, Historic Homes of the Auto Barons, and the Henry Ford Museum and Greenfield Village.

Come and take part in our League's work and enjoy the undiscovered sights of the area!

USE YOUR ESPERANTO TRAVEL SERVICE FOR ALL YOUR TRAVEL NEEDS!

Esperanto Vojaĝ-Servo
6104 La Salle Avenue
Oakland CA 94611
[510] 339-2001
FAX [510] 339-6317
e-mail: wrharmon@netcom.com

81a Universala Kongreso de Esperanto - 20-27 julio



La plej granda manifestacio de la tutmonda Esperanto-movado venas al unu el la plej fascinaj urboj de Eŭropo: **Prago.**

Prago estas tre grandaĝa urbo, digna, arkitekture alloga, afabla. Ĝi fondiĝis antaŭ pli ol mil jaroj. La bela rivero Vltava kun ties insuloj kaj pontoj donas agrablan fonon al la belaj konstruaĵoj ambaŭflanke. La Ponto de Karlo, ŝtopita per ornamaĵoj kaj artaĵoj, meritas mem duontagon da vizitado. Unu flanko de ĝi kondukas al Staré Město, la antikva urbo, kaj la alia al Hradčany, la Kastelo de Prago. Abundas katedraloj, monaĥejoj, palacoj, turoj, galerioj kaj ĝardenoj.

La kuirarto de Prago estas aparte mondfama kaj kvalite kaj kvante; kaj ni ne forgesu, ke la arto de bierfarado komenciĝis en Ĉeĥio! Ni ĝuu la kongreson!

Internacia Junulara Kongreso de Esperanto - 29 julio - 5 aŭgusto
Güntersberge, Germanio

Post-kongresa Ekskurso

28 julio - 5 aŭgusto

Ionel Oneț invites us to visit his native Romania - a country emerging from the shadow.

Eight years ago I left my native country to take up the hard road of exile. I was leaving behind a small remote village in the Western Mountains, a province rich in history and legend, a rich country with poor people, and most of my fears. Another life in another country, or should I say, another world, was opening up for me.

My enemies, still strongly holding onto power, would be far away from now on. But so would be the ones I loved. At least, they could move, and a slight possibility to see each other still remained. But how could one move the breathtaking Carpathians, the unique Danube delta, the old burghs and the new towns? From now on they would live only in my memory. Was I wrong! It took less than two years after my unhappy departure to have most of my dreams brought back. A "new" Romania emerged at the end of 1989, and with her, new dreams, hopes and possibilities for her inhabitants and friends.

I know better the "other" Romania. The one with poor but warm people, with less television and more affection, with less money but more travelling. As a tour guide and as a tourist I crisscrossed the country of Dracula, Enescu, Brâncuși, Nadia, and - unfortunately - Ceaușescu. I back-packed in her mountains, I got sunburned on her beaches, I wandered through her old burghs, I walked along her rivers, I shared her joy and sorrow; and in spite of all the hard times I experienced there, I never hated her - for no country, no people, deserve hatred.

It is for me more than a pleasure - it's an honor - to be able to show my fellow Esperantists a bit of the country where I was born, where I got my education, where I was infected with the LLZ virus, and where I became to a large extent what most of you know as

Ionel

Esperanto League for North America
P.O. Box 1129
El Cerrito CA 94530

Non-Profit Org.
U.S. Postage
PAID
Permit #1040
Leesburg, FL 34748